

# LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la  
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato  
Jarkolekto 2, n-ro 4 (10): novembro-decembro 2009

Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas.

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,  
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: [pieter.doumen@adsl4you.be](mailto:pieter.doumen@adsl4you.be)

## Redaktore...

*Karaj Gelegantoj,*

*Vi certe jam konstatis, ke nia revueto kreskis al dek paĝoj! Pro tio ŝuldos ne nur la ilustraĵoj kaj reklamoj, sed ankaŭ la multa materialo pri kiu ni disponas. Ni tamen ne intencas sendi al vi tro dikan revuon. Dek du estas por ni la maksimuma nombro de ĝiaj paĝoj.*

*Jam komenciĝis aŭtuno kun sia mistera sunlumo, siaj nebuloj, ventegoj kaj pluvoj, sed ankaŭ pli longaj, agrablaj vesperoj, kiuj donas al vi, se vi preferas legi ol spekti televidilon, pli da tempo fordoni vin al via ŝatata okupo.*

*En tiu ĉi numero vi trovos la rezolucion de la UK en Bjalistoko, kiu ŝajnas al ni tre grava. En ĝi oni emfazas la moralan flankon de Esperanto: frateco, respekto kaj egalrajteco por ĉiuj popoloj, ilia lingvo kaj kulturo. Tro ofte oni prisilentas en publikaj rilatoj tiun gravan aspekton de nia lingvo, kiu estas ĝia animo.*

*Plue estas la fama kaj tre interesa letero de D-ro Zamenhof al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko pri la estiĝo de lia ideo krei novan lingvon. La letero estas tiel longa, ke ni publikigos ĝin en pluraj partoj.*

*Sed estas en tiu ĉi numero ankaŭ pluraj aliaj aferoj, inter kiuj niaj kutimaj novaĵoj el Esperantio, kiuj memorigas al ni, ke ni havas gesamideanojn en la tuta mondo.*

*Mi esperas, ke vi legos ankaŭ tiun ĉi numeron kun multa plezuro!*

*Pieter Jan Doumen*

## Rezolucio de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto

*(Resolutie van het 94-ste Wereldcongres van Esperanto)*

La 94-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Bjalistoko (Pollando) de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2009, kun partopreno de 1860 homoj el 63 landoj en la jaro de la 150-a datreveno de la naskiĝo en Bjalistoko

de la kreinto de Esperanto, D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, en Bjalistoko, kaj samtempe en la Internacia Jaro de Akordiĝo, proklamita de la Unuiĝintaj Nacioj:

● **diskutinte** la kongresan temon “*Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ*”, kaj studinte kun aparta atento la vivon kaj verkojn de Zamenhof;

● **notinte** la fakton, ke la urbo kaj regiono de Bjalistoko pli kaj pli rekonas la escepte gravan rolon kiun Zamenhof ludis kaj daŭre ludas kiel monde rekonata figuro en la morala evoluo de la homaro;

● **konsciante**, ke tiu rekono konkretiĝis interalie en la malfermo de Centro Zamenhof fare de la urbaj aŭtoritatoj de Bjalistoko, kaj en la propono, ke la Bjalistoka Universitato ricevu la nomon Zamenhof;




● **memorigante**, ke, okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Lazaro Ludoviko Zamenhof, Unesko rekonis lin kiel unu el la grandaj personecoj de la mondo, kaj ke tra la jaroj venis multaj similaj rekonaj pri la meritoj de Zamenhof kiel granda monda pensulo;

● **kaj gratulante** la Unuiĝintajn Naciojn pro ĝiaj iniciatoj rilate al la ideo de akordiĝo, tiel esenca en mondo kiun dividas malakordoj pro antaŭjuĝoj kaj manko de toleremo;

**konstatas, ke :**

1. Per la internacia lingvo Esperanto Zamenhof kreis efikan ilon de internacia komunikado sur neŭtrala bazo, sen favori unu popolon super alia, kaj sen favori unu etnan lingvon super alia, kaj ke tra pli ol 120 jaroj da uzado Esperanto pruvis sian taŭgecon kiel internacia lingvo plene adaptebla kaj adaptita al ĉiuj komunikaj bezonoj.

2. Tamen, Zamenhof samtempe komprenis, ke lingvo estas kolektiva posedaĵo, kaj tial konfidis la evoluon de sia lingvo al ties komunumo de uzantoj, tiel ke Esperanto kaj ĝia kulturo



fariĝis esence kreaĵo kolektiva, kiu evoluis en spirito de lingva demokrateco.

3. Tion farante, Zamenhof ankaŭ rekonis, ke utiligo de neŭtrala lingvo en la internaciaj rilatoj helpas konservi lokajn kaj regionajn lingvojn kaj kulturojn kaj la identecon de ties komunumoj.

4. Zamenhof ankaŭ signife kontribuis, per siaj verkoj kaj agoj, al klopodoj forigi la malami-kecon inter la anoj de la diversaj religioj, al forigo de rasaj antaŭjuĝoj, kaj al la rifuzo de milito kiel akceptebla maniero solvi disputojn – valoroj same gravaj en la nuna epoko kiel en la epoko de Zamenhof.

5. Sekve Zamenhof plene meritas pli da atento ne nur kiel kreinto de lingvo, sed kiel persono kiu strebis al aŭtenta frateco inter la homoj surbaze de plena kaj reciproka kompreniĝo.

6. Tia frateco povas veni nur kiam la homoj interkompreniĝas en reciproka respekto – procedo en kiu Esperanto povas ludi kaj jam ludas unikan rolon.

7. Interkompreniĝo estas esenca paŝo al tiu profunda kaj daŭra akordiĝo, kiu estas la celata idealo de la Internacia Jaro de Akordiĝo.


8. Akordiĝo eblas nur en situacio en kiu lingvaj diferencoj ne formas baron al egaleca dialogo.

9. En tiu senco Esperanto estas unike taŭga kiel bazo por daŭra akordiĝo, kaj la Universala Esperanto-Asocio, per sia atento ankaŭ al moralaj valoroj kaj respekto de homaj rajtoj, povas signife roli en la plenumo de la celoj de la Internacia Jaro de Akordiĝo.

**Letero de D-ro L.L. Zamenhof al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (1895)**  
(*Brief van Dr. L.L. Zamenhof aan Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (1895)*)

Vi demandis min, kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian, kaj kia estis la historio de la lingvo Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis tiu ĉi tago. La tuta publika historio de la lingvo, t.e. komencante de la tago, kiam mi malkaŝe eliris kun ĝi, estas al vi plimalpli konata. Cetere tiun ĉi periodon de la lingvo estas nun, pro multaj kaŭzoj, ankoraŭ ne oportune tuŝadi. Mi rakontos al vi tial en ĝeneralaj trajtoj sole la historion de la naskiĝo de la lingvo.

Estos por mi malfacile rakonti al vi ĉion tion ĉi detale, ĉar multon mi mem jam forgesis. La ideo, al kies efektivigo mi dediĉis mian tutan vivon, aperis ĉe mi – estas ridinde tion diri – en la plej frua infaneco, kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis. Mi vivis kun ĝi kaj eĉ ne povas imagi min sen ĝi. Tiu ĉi cirkonstancoj parte klarigos al vi, kial mi kun tiom da obstineco laboris super ĝi, kaj kial mi, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj maldolĉaĵoj, ne forlasadis tiun ĉi ideon, kiel ĝin faris multaj aliaj, laborintaj sur la sama kampo.



Portreto de d-ro L.L. Zamenhof pentrita en 1907.  
de Felix Stone Moscheles (1833-1917)

Mi naskiĝis en Bjelostoko<sup>1</sup>, gubernio de Grodno (en Polujo). Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝan-taro konsistas el kvar diversaj elementoj: Ru-soj, Poloj, Germanoj kaj Hebreoj. Ĉiu el

<sup>1</sup> Rusa esperantigita nomo de Bjalistoko.

tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neami-ke rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multe-pezan malfeliĉon de diverslingveco kaj kon-vinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikajn partojn. Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj k.t.p. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi “doloro pro la mondo” ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la “grandaĝaj” posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke, kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.

Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ĉio ne fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentiĝas al la infano. Unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi, kompreneble, sen iaj difinitaj planoj. Mi ne memoras kiam, sed en ĉiu okazo sufiĉe frue, ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo internacia povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniu el la nun vivantaj nacioj. Kiam el la Bjelostoka reala lernejo (tiam ĝi estis ankoraŭ gimnazio) mi transiris en la Varsovian duan klasikan gimnazion, mi dum kelka tempo estis allogata al la lingvoj antikvaj kaj revis pri tio, ke mi iam veturados en la tuta mondo kaj per flamaj paroloj inklindos la homojn revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj por komuna uzado. Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al la firma konvinko, ke tio ĉi estas neebla, kaj mi komencis malklare revii pri nova, arta lingvo. Mi ofte tiam komencadis iajn provojn, elpensadis artefaritajn riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn k.t.p. Sed homa lingvo kun sia, ŝajnis la mi, senfina amaso da gramatikaj formoj, kun siaj centmiloj da vortoj, per kiuj min timigis la dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tiel artefarita kaj kolosa maŝino, ke mi ne unufoje<sup>1</sup> diradis al mi: “For la revojn!” Tiu ĉi laboro ne estas laŭ homaj fortoj!” Kaj tamen mi ĉiam revenadis al mia revo.

La Germanan kaj Francan lingvojn mi ellernadis en la infaneco, kiam oni ne povas ankoraŭ kompari kaj fari konkludojn. Sed kiam, estante en la 5-a klaso de la gimnazio, mi

komencis ellernadi la lingvon anglan, la simpleco de la angla gramatiko ĵetiĝis en miajn okulojn, precipe dank'al la kruta transiro al ĝi de la gramatikoj latina kaj greka. Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazaĵo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonaĵajn formojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko plej malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis serioze fordoniĝadi al mia revo. Sed la gigantaj vortaroj ne lasadis min trankvila.

Unu fojon, kiam mi estis en la 6-a aŭ 7-a klaso de la gimnazio, mi okaze turnis la atenton al la surskribo ‘Švejcárskaja’ (pordistejo), kiun mi jam multajn fojojn vidis, kaj poste al la elpendaĵo ‘Kondítorskaja’ (sukeraĵejo). Tiu ĉi ‘skaja’ ekinteresis min kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne bezoans aparte ellernadi. Tiu ĉi penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la terurajn gigantajn vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis rapide malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj.

(Daŭrigota)

## Novajoj el Esperantolando

(*Nieuws uit Esperantoland*)

**Francio** – *Novaj zeoj<sup>2</sup> en Herzberg am Harz.* –

La franca esperantisto kaj entreprenisto Michel Basso konstruos en aŭtuno 2009 du grandajn monumentojn, ‘Espero’ kaj ‘Esperanto’, en Herzberg am Harz, la germana

<sup>1</sup> Rusa esprimo signifanta ‘pli ol unu fojon’.

<sup>2</sup> Mallongigo de Zamenhof – Esperantaĵoj.



Esperanto-urbo. Por la betonkrustoj de la monumentoj estos akceptataj ŝtonetoj el la tuta mondo, tiel de individuoj kiel de formalaj Esperanto-organizaĵoj: kluboj, asocioj, instancoj. Multaj ŝtonetoj jam eniris el diversaj landoj kaj famaj lokoj, ekz. vitra fragmento kaj ŝtonetoj de la fama Esperanto-*platsen* en Gotenburg (Svedio), el Jerusalemo, Hiroŝimo ktp.

Se vi volas kapti la okazon kaj kontribui per simbola konstruero, bonvolu menciigi vian nomon kun loĝloko kaj lando, la trovlokon, specion de la ŝtono kaj similajn sciindaĵojn. Estos bonvenaj eĉ eventualaj interesaj rakontetoj, ligitaj al la sendata ŝtoneto. Oni zorgos pri preciza dokumentado de ĉio... Viajn ŝtonetojn vi povas sendi perpoŝte al: Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centra Herzberg, Grubenhagenstrasse 6, D-37412 Herzberg am Harz, Germanio.

(Fonto: Ret-Info, Hungario)



#### **Pollando 1** – Esperanto-Centro inaŭgurita! –

La 21-a de julio, Tadeusz Truskolaski, urbestro de Bialistoko, solene inaŭguris la novan Esperanto-Centro Ludwik Zamenhof, troviĝanta ĉe la strato Warszawska, n-ro 15 en Bjalistoko. Krom multaj amikoj de Esperanto, la inaŭguron partoprenis i.a. la vicurbestro Aleksander Sosna, prezidanto de la Urba Komitato Włodzimierz L. Kusak, kaj la aŭtoroj de la ekzpozicio, S-ino Jolanta Rogowska el la Historia Muzeo, kaj S-ro Andrzej Lechowski, direktoro de la Podlaĥia Muzeo en Bjalistoko. Samtempe oni inaŭguris la konstantan ekspozicion “Bjalistoko de la juna Zamenhof” kaj la du portempajn ekspoziciojn “Esperantaj ekslibrisoj kaj punktoj”.

La Centro estis kreita en la jaro de la 94-a UK de Esperanto, okazanta de la 25-a ĝis la 31-a de julio ĝuste en Bjalistoko, la naskiĝurbo de la kreinto-iniciatinto de la lingvo Esperanto. La Centro Zamenhof, kiu estas filio de la Bjalistoka Kulturcentro, gvidos la agadon, prezentantan la multkulturan karakteron de la urbo kaj la popularigadon de Zamenhof. Oni antaŭvidas, ke la Centro prezentados la konstantan ekspozicion, organizos la portempajn ekspoziciojn, gvidos la edukan aktivadon, okazigos seminariojn, prezentaĵojn kaj ekzercadojn.

Fotoserio pri la inaŭguro estas videbla ĉe <http://www.bialystok.pl/site.php?s=MDAwMTg3&a=MDU3Nzaz>.

(Fonto: Ret-Info, Hungario)

#### **Pollando 2** – Zamenhof-monumento atakita. –


Vespere de la 29-a de julio vandalo atakis la monumenton de Zamenhof en la centro de Bjalistoko, kie estis okazanta la Universala Kongreso de Esperanto. La antaŭan nokton persono ĵetis botelon kun bruliga likvaĵo sur la monumenton de Zamenhof, rakontis loka gazeto. La incidento ĉe la busto de Zamenhof okazis jaŭde post la 19-a horo. Laŭ atestantoj junulo eble 18-jara en kapuĉo prenis ion el sia sako, verŝis farbon sur la vizaĝon de Zamenhof kaj rapide forkuris. Neniu ĉeestanto havis la tempon interveni.

La loka gazeto *Kurier Poranny* supozas, ke temis pri rasisma atako, kredeble pro la juda deveno de Zamenhof. La retpaĝo de la gazeto rakontas, ke jam antaŭ la kongreso la “tendo Zamenhof” ĉe la kongresjo estis bruligita, kaj ke nekonatoj tranĉis la pneŭmatikojn de aŭtobuso de esperantistoj. Ĝi ankaŭ mencias atakon kontraŭ la amasloĝejo de junaj kongresanoj, okazintan nokte inter lundo kaj mardo. Laŭ ĝi en la nokto inter merkredo kaj jaŭdo nekonata atakanto ĵetis botelon kun bruliga likvaĵo kontraŭ la novan Zamenhof-Centron. La ŝtona domo ne ekbrulis, kaj la okazintaĵo estis malkovrita de gardisto nur jaŭde matene.

(*El Libero Folio*, fonto: Ret-Info)

#### **Germanio 1** – IJK en la germana TV en Eo –

Marde la 22-an de julio en sia noktomeza programo “Nachtmagazin” (Nokta Magazino) la unua germana televidkanalo ARD elsendis triminutan raporton pri la 65-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, organizita inter la 18-a kaj la 25-a de julio en Liberec (Ĉeĥio). Laŭ statistikoj de ARD vidis tiun raporton 560.000 spektantoj.



La raporto elstaras ne nur pro tio, ke preparis ĝin la eksterlanda redakcio de la germana ARD en Ĉeĥio, sed ankaŭ pro la fakto, ke ĝi estas preskaŭ komplete parolata en Esperanto, kun subtekstoj en la germana lingvo. Kun escepta sindediĉo la redaktoro Danko Handrick, helpata de la kongresanoj Carsten Mischke kaj Gregor Hinker, celis montri al la spektantoj “vivan Esperanton”, kio estas ankaŭ la nomo de tiu raporto, kiun interesatoj povas spekti ĉe <http://www.youtube.com/watch?v=rwqJITm5xrM>.

La okazinta 65-a IJK estas la unua sur la teritorio de Ĉeĥio. Atenton meritas ankaŭ la trilanda kunlaboro inter la junularaj Esperanto-asocioj de Ĉeĥio, Germanio kaj Pollando.

Marek Blahuš

(Fonto: Ret-Info, Hungario)

**Germanio 2** – *Konferenco de ALTE kaj Goethe-Instituto* – Zsófia Kóródy, la reprezentantino de UEA kaj de ties nova ekzamensistemo kunmetita laŭ la Komuna Eŭropa Referenc-kadro (KER), partoprenis en la komuna konferenco de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE) kaj Goethe-Instituto la 18-an kaj 19-an de septembro en Berlino. Jam antaŭ la konferenco Zsófia Kóródy ricevis dankvortojn de la ALTE-sekretario pro ŝia kontribuo al la finredakto de la nova praktika ‘Manlibro por Testprikaksado kaj Ekzamenado’.

Gerald Tucker, fakestro por la ekzamenoj de la Germana Esperanto-Instituto, kompetente trarigardis kaj plibonigis la 126-paĝan manuskripton. Jam de pli ol jaro S-ro Tucker sin dediĉas al la akordiĝo de la ekzamenoj de la Germana Esperanto-Instituto kun la postularo de KER en la niveloj A1 kaj A2. Tio povos

fariĝi modelo por la ekzamensistemoj en aliaj landoj kaj por pli vasta internacia uzo.

Dum la konferenco Zsófia Kóródy parolis kun kunlaborantoj de ALTE pri la ekzamena regularo por blindaj esperantistoj, kiun aprobis la Komitatoj de ILEI kaj UEA en julio 2009. Ŝi informis ilin ankaŭ pri la bonaj rezultoj de la unuaj naŭ monatoj de la KER-ekzamenoj de UEA – jam ĉ. 1000 ekzamenitoj – kaj prezentis la libron ‘Esperanto de Nivelo al Nivelo’, kiu enhavas modelajn testojn laŭ KER.

(Fonto: Ret-Info, Hungario)

**Ruslando 1** - *1000 kantoj en vikia E-kantaro* –

Dum la lastaj tagoj la kvanto de kantotekstoj, haveblaj en la kantaro-vikio superis 1000! Tio ĉi estis la rezulto de kelkara internacia kunlaboro, farata de esperantistoj en la tuta mondo. Danke al la vikia teknologio la kantaro estas malfermita por ĉiuj kiuj interesiĝas pri muziko. Iu ajn kunlaboranto povas enmeti novan kantotekston, alia korekti erarojn, plua alia povas aldoni muziknotojn aŭ kompletigan informon ktp.

La kantaro estas fonto de kantotekstoj por lernantoj kaj gvidantoj de E-kursoj. Fanoj trovas en ĝi kompletajn albumojn de ŝatataj muzikbandoj kaj videaĵojn de kantoj. Aŭtoroj kaj tradukantoj uzas ĝin por publikigi siajn verkojn. En la vikio haveblas kaj klasikaj kaj modernaj kantoj. Multas kantoj, tradukitaj el naciaj lingvoj, movadaj, porkorusaj, porinfanaj, rokaj, popaj kaj aliaj.

En la vikio vi povas trovi kantojn diversmaniere: laŭ kategorio, laŭ nomo aŭ per teksto-frazo. La kantoj estas aranĝitaj laŭ albumoj, kaj la albumoj eniras la diskografion de la koncernaj aŭtoroj aŭ muzikbandoj. Por prezenti la kantojn vi povas trovi muzikfoliojn kun akordoj por gitarludado. Vi povas sekvi la kantotekstojn kaj ankaŭ spekti videaĵojn aŭ uzi karaokeon. La funkciadon de la kantaro-vikio subtenas Excel, kiu dum jaroj gastigas ĝin en sia servilo. Adreso de la kantaro-vikio:

<http://ikso.net/kantaro/> .

(Fonto: Ret-Info, Hungario)

**Ruslando 2** – *Esperanta aranĝo en trajno* –

En junio 2010 estos organizita speciala vojaĝo en la transsiberia trajno tra Rusio al la 6-a Azia Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Ulanbatoro (Mongolio). Tiu vojaĝo de Moskvo (aŭ Peterburgo) tra Siberio – apud la lago Bajkalo – daŭros 10-12 tagojn, do ĝi mem estas iu ekskluziva Esperanto-renkontiĝo.

Nuntempe jam pretas kunvojaĝi proksimume 10 esperantistoj el Francio, Italio kaj Germanio, kiuj aŭ jam tiel trajnumis al la UK en Johohamo (Japanio, 2007) aŭ informiĝis pri la efektiva vojaĝo 'E-karavane'.

La itinero de la Esperanto-karavano al Mongolio estas ankoraŭ provizora, kaj ĝia konkretigo dependas de la preferoj de la partoprenantoj. Oni elektos unu el la variantoj. La varianto kiu kolektos plej multe da jesoĵoj, estos efektiva. La prezoj de la vojaĝo vin surprizoj kaj allogoj! Pliajn detalojn kaj konkretan repaĝon pri tiu speciala evento en junio 2010 en Mongolio, vi trovu en la 'Internacia Kalendaro de Esperanto-Aranĝoj' ĉe <http://www.eventoj.hu> (Fonto Ret-Info, Hungario)



### Ruslando 3 – Medvedev diras 'ne' al Eo –

“Se Rusio oficiale ekuzas Esperanton en internaciaj rilatoj, tio signifus libervolan fordonon de unu el la atributoj de nacia suvereno, la propra lingvo”. Tiel argumentas kontraŭ Esperanto la oficejo de la rusa prezidento Dmitrij Medvedev, responde al letero de la Rusia Esperanto-Unio (REU). La respondo ne subskribis la prezidento mem, sed funkciulo de lia oficejo, I. Beljajev.

En la letero de REU vicprezidanto Nikolaj Gudskov kaj estrarano Valentin Seguru-Zajcev, esprimis sian zorgon pri la kreskanta potenco de la angla lingvo kaj la malhelpoj kiujn renkontas la instruado de Esperanto en la rusaj altlernejoj. La prezidenta letero respondas al komplete aliaj demandoj, ol tiuj starigitaj de REU, ŝajnigante, ke la esperantistoj volas ĉesigi la uzon de la rusa lingvo en internaciaj rilatoj. Ili skribis ke “la uzo de la ‘tutmonda angla lingvo’ atingis tian teruran nivelon, ke estas minacata mem la ekzisto de naciaj kulturoj kaj lingvoj – hodiaŭ tiuj de malgrandaj, morgaŭ ankaŭ de grandaj popoloj”, kaj ili krome mencias la spertojn de Hungario, ke Esperanto laŭ ili estas la tria studata fremda lingvo post la angla kaj la germana. Tiun situacion ili kontrastigas kun la alt-

lernejoj en Rusio, kie laŭ ili ‘fremda lingvo’ praktike egalas al ‘angla lingvo’.

Por korekti tiun situacion REU proponas, ke la demandoj de lingvo kaj internacia komunikado estu konsiderataj en la nova oficiala sekureca strategio. Aldone la studentoj en Rusio laŭ REU estu devigataj studi ne unu, sed du fremdaj lingvojn, kaj inter tiuj lingvoj estu elektebla ankaŭ Esperanto. (El 'Libera Folio')

### Mia Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko (sekvo)

(Mijn Esperantowereldcongres in Bialystok: vervolg)

Je la 5-a mi iris al la salono Privat por vidi du filmojn de Roman Dobrzynski respektive pri la UK en Pekino kaj la vivo de la pekinoj. La granda salono – fakte universitata aŭlo – estis plenplena je homoj. Interesaj filmoj. En la unua multaj kongresanoj, precipe ĉinoj, parolis pri sia esperantisteco en bona Esperanto. Iu ĉinino deklaris, ke post dek jaroj da anglaj kursoj, ŝi ne kapablis diri unu frazo kaj apenaŭ povis skribi ion en tiu lingvo. Post dekmonta kurso de Esperanto ŝi jam povis esprimi sin en tiu lingvo. Dobrzynski estis dononta ankoraŭ kvar filmsesiojn dum la kongreso. Post la vespermanĝo en la apuda tendo, mi restis tie por babili kun kelkajn malnovajn geamikojn. Je la 19-a mi iris al la tendego Zamenhof por ĉeesti la nacian vesperon. Tie mi trafis miajn samklubanojn. Ĝis la 22-a grupoj de polaj junuloj dancis kaj kantis en folkloraj kaj modernaj vestaĵoj. Ni povis spekti ĉion sur grandaj ekranoj. Min frapis la tre alta kvalito de la prezentadoj. Ankaŭ la ceteraj prezentadoj kiujn mi ĉeestis poste, trafis min per sia granda perfekteco, kiel cetere la tuta kongreso, kiu certe estis la rezulto de enormaj klopodoj de la tuta urbo. Fine de la prezentado Remy Sproelants invitis nin trinki glason da biero en sia hotelo, kiu staris tuj apude. Poste taksio reveturigis nin al nia hotelo por 10 zlotoj.

Lunde matene Rik proponis al ni viziti la lokon kie staris la naskiĝdomo de Zamenhof kaj la urbocentron, kion ni akceptis. Ni estis frapitaj de la multaj Esperanto-flagoj kaj ŝildoj kiuj atentigis pri la kongreso, la pureco de la stratoj kaj la ĝenerala Esperanto-ama etoso de la urbo. Oni videble faris ĉion por havigi al la kongresanoj agrablan restadon. Sur eta placo ni haltis ĉe monumento de Zamenhof – moderna busto, kiu ne multe plaĉis al mi, ĉar ĝi ne reŝpegulis la dolĉan karakteron de nia majstro.



De tie ni iris al la loko en la Verda Strato kie iam staris la naskiĝdomo de Zamenhof. Antaŭ multaj jaroj ĝi estis malkonstruita por permesi konstrui tie apartamentaron. Sur parto de tiu loko kreskas gazono, kaj staras ŝildo kun teksto memore al tiu domo. Sur la blinda fasado de la nova konstruaĵo turnita al la gazono ni admiris la tri konatajn pentraĵojn, el kiuj la meza montras bonfartan Zamenhof en frako kaj kun cigaro starantan sur balkono.

Poste ni iris al la tute nova muzeo Zamenhof. Je nia surprizo ni vidis homojn enirantaj la domon. Ni do sekvis ilin kaj konstatis, ke ni falis en la malferman ceremonion de la muzeo. Ĉeestis ĉirkaŭ dudek gravuloj: la urbestro, la vicurbestro kaj prezidanto de la LKK, Louis Christophe Zamenhof, la alte protektanto de la kongreso, la estraro de UEA ktp. Oni paroladis en Esperanto kaj la pola, kiun tradukis flue paro<sup>2</sup>lanta esperantisto, oni trinkis ĉampanjon aŭ fruktosukon kaj poste oni vizitis la muzeon. En unu el la salonoj oni ekspoziciis malnovajn laŭnature grandigitajn fotojn de la juna Zamenhof en diversaj situacioj. Estis vere impresa. Frapis nin, ke en sia hejmlando Zamenhof estas konsiderata kiel vere grava persono.

Posttagmeze ni reiris taksie al la kongresejo, kie mi ĉeestis la prelegon: “Sekretoj de la pola himno”, kiu respegulas la pesimisman mensostaton de la poloj post la divido de sia lando inter prusoj, aŭstroj kaj rusoj en la 18-a jarcento. Poste mi vizitis prelegon de Katalin Kovats pri “edukado-net”. Ŝi precipe parolis pri la renovigo de tiu retejo, por kiu ŝi bezonis multan monon, kiun ŝi tamen sukcesis kunigi. Mi forlasis ĝin antaŭ la fino por iri spekti alian filmon de Dobrzynski, ĉi-foje pri la brazila projekto ‘Esperanto’, per kiu la geedzoj Grattapaglia sukcese edukos strat- kaj justicinfanojn. Post la vespermanĝo ni tri iris vidi kaj aŭskulti la koncerton sur la urba placo ‘Rynek’ (vendo-placo), prezentatan de la Orkestro kaj Koruso de la Podlaĥia Operejo kaj Filharmonio de Bjalistoko. Sidante sur la trotuaro antaŭ la kafejo ‘Esperanto’ kaj trinkante bongustan bieron, ni ĝuis en agrabla kompanio la belegajn sonojn kaj voĉojn de la ensemblo, kiuj prezentis ne nur klasikajn muzikaĵojn sed ankaŭ kantojn kun Esperanto-tekstojn. Por fini ĝi ofertis al ni brilan lastan parton de la 9-a simfonio de Beethoven kun la Esperanto-teksto de Zamenhof! Kortuŝa kaj neforgesebla sperto!

Mardon antaŭtagmeze mi ĉeestis en la kongresejo ‘La estraro respondas’ kaj la publikan sesion de la Akademio de Esperanto, kie la



akademianoj respondis al ofte trivialaj demandoj de la publiko. Posttagmeze mi aŭskultis prelegon pri la horora ‘Ekstermado dum la jaroj 1939-1945’ en Pollando. Je la 5-a mi denove spektis filmon de Dobrzynski. Ankaŭ ĉi-foje mi restis en la restoracio post la vespermanĝo, kie mi konatiĝis kaj babilis kun kelkaj de mi konataj esperantistoj. Je la 21-a mi eliris por spekti la fajroteatron sur herbejo apud la tendoj. Gejunuloj svingis per bastonoj je kies finaĵo brulis fajro sur la ritmo de muziko. Ĉar jam estis malhela, la fajroj tre bele efikis. Mi ne komprenis, kiel eblas, ke ili ne bruligis sin.

Merkredo estis, kiel kutime, la tago de la ekskursoj. Ni estis elektintaj la Valo de Biebrza, granda naturparko kun vastaj arbaroj, marĉoj kaj tre largaj, malrapidaj riveroj. Kun nia grupo iris du gejunuloj, kiuj flue komentis en Esperanto. Alveninte tie per aŭtobuso, ni faris promenadon en du grupoj tra arbaro. Frapis min, ke tie kreskis la samaj arboj kaj floroj kiel ĉe ni en Kampino. Poste ni vizitis la fortikaĵon de Osowiec. Ĝi estis konstruita de la rusoj kaj troviĝas grandparte subtere. Post la foriro de la rusoj en 1989 tie regule restadis polaj trupoj. Fine ni promenis tra vastega marĉo sur lignaj padoj. Sur seka loko staris ligna trietaĝa turo. La ĉiĉerono konsilis nin grimpi sur la turon, ĉar de tie oni havos tre belan panoramon. Ni do grimpis sur la turon, sed supre ni estis atakataj de svarmo de speco de grandaj sovaĝaj abeloj. Kelkaj tuj kuris malsupren, inter kiuj Rik, kiu, malgraŭ ke li forbatis ilin per ambaŭ brakoj, ricevis kvar aŭ kvin pikojn. Aliaj atendis, ĝis la abeloj iomete retransviliĝis, sed kiam mi tre trankvile malsupreniris, abelo trafis inter miaj maloftaj haroj kaj pikis min super la dekstra orelo. Feliĉe evidentiĝis poste, ke la pikoj ne havis malbonajn sekvojn. (Daŭrigota)

**Rakonto (verhaal):**

## **La Amhistorio de Alfred Nobel (2)** *(De liefdesroman van Alfred Nobel (2))*

### **Nepreparita artfajraĵo**

Kiam en 1851 li revenis al Rusio, Alfred Nobel konatiĝis kun nitroglicerino danke al iu pro-fesoro en Sankt-Peterburgo, kiu kaŭzis malgrandajn eksperimentajn eksplodojn frapante per martelo sur fluidaĵo, inventita de la itala kemiisto, Ascanio Sobrero. Tiu ĉi preparis oleecan fluidaĵon, verŝante glicerinon sur miksaĵon el sulfuracido kaj nitratacido. Tiun produkton li nomis 'piroglicerino' (de la greka 'pyr' = fajro). Sed la italo ne sukcesis bridi sian nestabilan kaj danĝeran eksplodaĵon, kaj tial lia inventaĵo trovis nenian praktikan aplikon.



Oficejo de Nobel en Bofors, Svedio

Alfred tuj antaŭsentis la industriajn eblecojn de tiu produkto. Li aĉetis la rajtojn de la itala Sobrero, kiu en la estonteco estis direktonta unu el liaj ĉefaj fabrikoj. Multajn jarojn li laboris super la perfektigo de la eksplodaĵo, kombinante nigran polvon kaj nitroglicerinon. Finfine li sukcesis perfektigi ĝin en 1864. Tiu unua sukceso igis lin kredi, ke li fine mastris triun kapriceman eksplodaĵon. En 1861 li fondis fabrikon en Svedio kaj alian en 1865 en Germanio. En 1866 li foriris al Nov-Jorko, kie li prenis breveton je sia eksplodaĵo kaj subskribis kontrakton kun pluraj industriaj societoj por la fabrikado de nitroglicerino.



Eksplodo en fabriko en Stokholmo

Sed la tempo de la granda sukceso ankoraŭ ne venis. En 1866 eksplodo detruis la deponejon de nitroglicerino en San Francisko (Usono), mortigante kvinon da personoj. Ses monatojn poste ŝipo, transportanta botelojn de nitroglicerino, dissaltis apud Panamo. Ĉe tio kvindek homoj perdis la vivon kaj multaj estis vunditaj. Post tio sekvis la fabriko de Nobel

por eksplodaĵoj en Kummel apud Hamburgo, Germanio. Estis la ĉefa fabriko en Eŭropo. Tiam sekvis liaj detruantaj eksplodoj en Svedio kaj Aŭstralio. La sekvoj estis gravaj kaj igis sin senti mondnivele. Multaj naciaj registaroj malpermesis la uzon kaj transporton de la danĝera substanco. La produktado de nitroglicerino ŝajnis estis kondamnita.

### **Dinamito konkeras la mondon**

Nobel ne malesperis. Li nelacigeble eksperimentis per novaj kombinaĵoj de stabiligantaj materioj, sed la plej multaj senfortigis aŭ misformis la eksplodon en forbruligon sen uzebla forto. Kiel por multaj aliaj grandaj inventaĵoj, simpla hazardo liveris la solvon de tiu problemo. Kiam iutage li forlasis sian fabrikon en Kummel, Nobel rimarkis, ke iom da nitroglicerino estis falinta sur la alvojo. La sabla tero estis miksiĝinta kun la fluidaĵo, sed anstataŭ formi ian kaĉon, ĝi estis transformita en firman kaj samtempe orkoloran amason. La miksaĵo kunmetis sin mem en ideala proporcio.

Kelkajn tagojn poste Nobel disponis pri firma kaj forta eksplodaĵo, apenaŭ malpli forta ol pura nitroglicerino, kun perfekta stabileco kaj transportebla kun multe malpli da danĝero. La uzata pora kaj argila materio portis la nomon "Kieselguhr" kaj abundis en Norda Germanio. Alfred Nobel brevetigis sian novan inventaĵon sub la nomo 'dinamito' laŭ la greka vorto por 'forto', 'dynamis'.

En 1867 la fabrikoj de Nobel produktis entute dek unu tunojn da dinamito. Sep jarojn poste ili liveris tri mil tunojn en unu jaro. Intertempe Nobel fondis dek unu fabrikojn en same tiom da eŭropaj landoj. En Usono li fondis la 'Giant Powder Company' (Gigantan Pulvo-Kompanion) por la fabrikado kaj vendado de dinamito. Ĉiuj karbo- kaj ŝtonminejoj tra la tuta mondo deziris aĉeti la novan eksplodaĵon. Dinamito fariĝis la plej bona industria afero en tiu tempo, kaj Nobel fariĝis la plej konata industriisto en la mondo.

René en Francien de Jong  
Baan naar Bree 27, Peer  
Tel. : 011 - 63.26.33  
Fax : 011 - 66.26.33  
Dinsdagavond & woensdag gesloten  
www.fleurie.be



En Francio li renkontis la plej grandajn mal-facilaĵojn por siaj industriaj entreprenoj pro la ŝtata monopolio koncerne la fabrikadon de eksplodaĵoj. La milito de 1870 kontraŭ Germanio kun la spektaklo de la teruraj detruoj per dinamito fare de la germanaj trupoj estis necesaj por decidigi la francan registaron rifuĝi al la sveda industriisto.

### La perfekta sekretariino

Intensa laboro kaj vojaĝado ne lasis al li multan tempon por privata vivo. Je la aĝo de 43 jaroj li jam sentis sin maljuna viro. Por siaj aferoj Nobel konstante vojaĝis de unu ĉefurbo al alia, kaj samtempe de unu terma institucio al alia por flegi sian sanon. Tiel li fariĝis la plej riĉa vaganto en la mondo! Li ankaŭ fariĝis la plej cinika viro de sia tempo. En 1875 li diris al unu el siaj societanoj. “En mia ĉirkaŭaĵo mi vidas nur homojn kiuj volas profiti de miaj vizitoj. Nur inter hundoj homo povas fari al si amikojn!”

Malgraŭ tiaj amaraj diraĵoj li serĉis distriĝon por ĉiuj siaj zorgoj, sed apud multe pli ĝojigaj kreitaĵoj. Mallonge post kiam Bertha von Suttner forlasis lin, li renkontis en Baden apud Vieno, kie li faris akvokuracon, la junan floristinon Sofia Hess. Ŝi havis dudek jarojn, estis blonda kaj bone formita. Ŝi ŝajnis havi ĉiujn kvalitojn por esti perfekta ‘sekretariino’.



Baronino Bertha von Suttner

Kun tiu titolo Nobel kunprenis ŝin al Parizo, kie li lukse instalas ŝin. Ŝajnas, ke la maljuna magnato firmege korligiĝis al la bela knabino, kaj ke li eble eĉ havis la intencon edziĝi al ŝi.

Sed kiam li provis fari el ŝi distingitan instruitan virinon, dignan por iri kun li eksteren en la grandan mondon, li malkovris, ke ŝi estas eksterordinare vulgara. Nobel, kiu estis kutimiĝinta al intelektula kaj delikata virino, kiel baronino Bertha von Suttner, tre baldaŭ ne povis toleri ŝin. Li resendis ŝin al Vieno kaj donis al ŝi gravan pension, ne merititan per ŝiaj ‘virtoj’.

### Dinamito en la sango

Alfred Nobel aktive okupiĝis pri la virina sekso, sed tamen trovis tempon, por daŭrigi siajn esplorojn pri eksplodaĵoj. Tiamaniere li kombinis, en 1887, nitroglicerino kun fulmikotumo kaj kolodiuo, kaj obtenis gelatinon, kiu estas same stabila, kiel dinamito. La vendo de tiuj eksplodema ‘ĝelo’ tuj atingis altegajn ciferojn kaj aldonis pliajn grandegajn enspezojn al la jam fantazie riĉa Nobel.

Dum la jaroj 1894-1895 la sanstato de Alfred Nobel rapide plimalboniĝis. Li regule havis korpremiĝojn, kaj liaj vejnoj estis danĝere kalkiĝintaj. Tie ĉi situas la fama epizodo de la kuraco per nitroglicerino, kiun iuj historiistoj stampis kiel “tro belan por esti vera”. Kiel ajn, la medicinisto de Nobel vere povis preskribi nenion pli bonan al viro, kiu laŭlitere havis dinamiton en la sango.

En tiu periodo Nobel rezignis pri la aktiva prezidenteco de siaj multaj konsilioj de administrantoj kaj komencis redakti sian testamenton. Verfakte li redaktis plurajn, ĉiam adaptante unu aŭ alian klaŭzon laŭ la evoluo de siaj ideoj. Ĉiuj scias, ke la definitiva teksto enhavis la kvin konatajn Nobel-premiojn, aljuĝatajn ankoraŭ en nia tempo: kemio, fiziko, fiziologio kaj medicino, literaturo, paco. Sed kion ne ĉiuj scias, estas, ke tiu lasta premio, la plej spektakla inter ĉiuj, probable ne ekzistus, se Nobel ne estus koninta la belan Bertha von Chinie.

(René Tholy, trad. P.J. Doumen)

*Baronino Bertha von Suttner ankaŭ verkis tre konatan pacifisman romanon, kiu estis tradukita en multajn lingvojn. En Esperanton ĝi estis tradukita far Prof. Armand Caumont kaj aperis en marto 1914 sub la titolo: “For la batalilojn!” D-ro Heinrich Arnhold, kiu verkis la antaŭparolon de la romano, skribis ke baronino Bertha von Suttner konsilis lin lerni Esperanton, kion li faris. Al la Dresdena Esperanto-Societo, kies membro li estis, ŝi iam sendis telegramon kun la teksto: “Esperanto kaj Pacifismo estas gekuzoj”.*

## Poezio kaj poezio

*(Poësie en poësie)*

Evidentas, ke poezio ne plu estas tre populara en nia tempo. Poemkolektoj malfacile vendiĝas. Sed tio ne ĉiam estis la kazo!

Ekde la antikva tempo poezio estis la preferata literatura formo. En la antikva Greklando kaj la romia imperio multaj poetoj ekde Homero, la plej admirata el ĉiuj. Ĉiu kiu sentis la bezonon esprimi sin, faris tion en versoj. La famaj epopeoj de Homero – la Iliado kaj la Odiseado – la Eneado de Vergilio, la tragedioj de Sofoklo, Eŭripido kaj Eŝilo, la poemoj de Ovidio kaj Horatio ankoraŭ ĉiam estas vaste admirataj. Nur historio – ekde Herodoto –, filosofio – ekde Platono – kaj personaj leteroj – ekz. tiuj de Cicerono al sia amiko Tito Pomponio Attiko –, estis verkitaj proze. Ĉio alia, eĉ scienco, aŭ kion oni konsideris kiel sciencan, estis verŝita en poezian formon. Ekzemplo de tio estas la ‘Historia Naturalis’ de Plinio Sekundo la Maljuna.

Prozo, kiu ne estis konsiderata kiel arta formo, estis do la natura rimedo por priskribi ĉiutagajn aŭ aliajn realajn faktojn.

Tiu koncepto daŭris pli-malpli ĝis la tempo de Romantikismo (18-a jarcento). Ĝis tiam gravis en poezio la perfekta ekstera formo, ekz. soneto, la ritmo, rimoj kaj eleganta lingvo. La poeto ne parolis pri personaj sentoj aŭ spertoj. La poezio estis do tute ekstraverta.

La antikvaj poetoj ne verkis kun rimoj. Tio ŝajnas esti inventaĵo de la ĝermanaj popoloj. Kun la alveno de Romantikismo la poetoj komencis paroli pri siaj propraj sentoj kaj spertoj kaj inventis novajn formojn. Tiu evoluo kontinuis ĝis nun. Formo kaj eleganta lingvo ne plu gravas, sed jes la propraj sentoj kaj la riĉaj bildoj. Sed tiu tendenco ofte finiĝas en hermetika poezio, kiu estas nur sekvo de belaj sensignifaj sonoj, kiel muziko.

Tiu evoluo estas certe unu el la kaŭzoj pro kiuj oni ŝatas poezion hodiaŭ multe malpli. Alia kaŭzo estas certe ankaŭ la fakto, ke antaŭ la estiĝo de demokratio nur la nobeloj kaj riĉuloj kapablis skribi kaj legi, dum la eta popolo malhavis la eblecon ekkoni la grandajn poeziajn verkojn. Ekde Romantikismo prozo fariĝis pli grava, tiel ke oni povas nun diri, ke nia tempo estas la tempo de proza.

Tamen ekzistas granda diferenco inter poezio kaj poezio. Epopeo, kiu estas tradicie, longa poemo pri herooj, estas tute alia afero ol poemo ekz. de Guido Gezelle. Epopeo havas komuna kun poemo de Gezelle nur ke ambaŭ

estas verkitaj en poezia formo. Laŭ enhavo ili tute malsimilas. Oni povus diri, ke epopeo estas romano en poezia formo. Tiel ekzemple oni ofte diras de ‘Milito kaj Paco’ de la granda rusa verkisto Leo Tolstoj, ke ĝi estas epopeo en proza formo. Sed fakte ĉiu granda romano kun multaj personoj kaj vasta temo meritas la nomon epopeo. *Pieter Jan Doumen*

### El ‘La infana raso’

*(Uit ‘Het kinderras’)*

**de William Auld (1924-2006)**

*La ĉi-suba poemo estas la komenco de la longa poemo ‘La infana raso’ (25 ĉapitroj) de la fama skota esperanta poeto William Auld. La poemo, kiu aperis en 1956, estis tradukita en multajn li-gvojn. Ĝia temo estas la rolo de la homa raso en la tempo kaj kosmoso. La poemon oni nomas la unua epopeo en Esperanto. En 1999 la internacia Pen-club prezentis lin kiel kandidaton por la Nobel-premio pri literaturo. Oni konsideras lin kiel unu el la plej grandaj poetoj de Esperanto.*

Saluton, masonisto, mia prapatro Ruben,  
kui dum tuta vivo grimpadis supren-suben,  
ĉizante sur preĝejo gargojlojn kaj anĝelojn!  
Kaj vin, ho posteulo de Ruben, kiu velojn  
de karavelo hisis kaj sur la mar’ piratis  
kaj la filinon duan de tavernisto svatis  
kaj lasis ŝin graveda kaj malaperis tute  
sur marofundon – kara, mi kantas vin salute!  
(Ja ankaŭ vin aparte, ho tavernistfilino,  
avino mia praa, al kies mola sino  
sin premis tiu filo, kiu en posta vivo  
dediĉis sin al rabo, al murdo kaj lascivo,  
kaj dek bastardojn patris, el kiuj unu iris  
milite al Polujo, kaj tie vaste viris,  
al sia semofluo malfermis larĝe kluzojn,  
al mi testamentante milope polajn kuzojn!)

Al vi, centmil prapatroj ŝvitintaj sub servuto,  
se via tre simila pranepo jen saluto ;  
sed ege vin surprizus, ke li salutas ame  
kiel parenco viajn jugintojn tute same.  
Al vi ja ŝajnus strange, ke filo de l’kastelo  
kaj via bova ido en trua sklavkitelo  
per ia sortkaprico egale kontribuas  
al tiu sango, kiu en miaj vejnoj fluas.  
(Verdire, la surprizo ne estus via sole;  
eĉ pli la kastelfilo min gapus senparole!)

Kaj ankaŭ vin, praaĵoj kaj vilaj sovaĝuloj,  
kiuj rezistis venke per glavoj kaj ŝtonruloj  
invadajn legianojn de roma Agrikolo –  
mi vin salutas: Ave!

*La legantoj sufiĉe konas Guido Gezelle (1830-1899), la plej originalan flandran poe-*

ton de la 19-a jarcento, mistikan lirikiston, religiecan romantikiston, naturamanton kaj lingvovirtuozon. Ĉi-sube vi povas legi mallongan, juvelan poemon de Guido Gezelle, tradukitan de Hector Vermuyten.

**Se aŭskultas la anim'**

Ĉio lingvon havas  
se aŭskultas la anim',  
eĉ murmuro gravas  
pro ĉi lingvo kaj esprim':  
foliar' sur tero  
babiladas kun fervor',  
akvo de l' rivero  
laŭtparole ondas for,  
vent' kaj nub' tremetas  
pro la sankta di-pied',  
klare interpretas  
pri l' kaŝita Vort kaj Kred'...  
Ĉio lingvo havas!

**La Limburga Esperanto-Asocio**

*(De Limburgse Esperantovereniging)*

La aktivaĵoj de LEA okazos la lastan jaŭdon de ĉiu monato (escepte en decembro) en lokalo de la Kultura Centro 'Het Poorthuis', Zuidervest, Peer, de la 20.00 ĝis la 22.00 horo.

**Aktivaĵoj en septembro kaj oktobro**

La 24-an de septembro Henri Schutters rakontis pri la UK en Bjalistoko, ilustrante ĝin per multaj bildoj, projektataj per episkopo.

La 29-an de oktobro An Olijslagers denove gvidis agrablan Esperantan skrabloludon. Ŝi mem gajnis la ludon per 123 punktojn!

**Programo por novembro kaj decembro**

La 26-an de novembro: Esperanta Forumo

Albert Claessen prelegos pri la 'Esperanta Forumo', kiun li mem kunmetis por FEL. La forumo celas doni al ĉiuj esperantistoj la eblecon interrete interkomunikiĝi.

La prelego de Jan Doumen pri la 'Antikvaj Belgioj' estas prokrastita al posta dato.

La 17-an de decembro: Zamenhoffesto

Nia Zamenhoffesto okazos do du tagoj post la 150-a datreveno de lia naskiĝo. La festmanĝo estos servita en la restoracio "'t Torenhuis" en Peer, apud la preĝejo, kie oni atendas vin je la 19.30 horo, kaj kostas € 10,00 por unu persono. La trinkaĵoj konsumataj dum la manĝo ne estas inkluzivigitaj. Ĉe via eniro vi ricevos glason da trinkaĵo ofertita de la kaso.

Ankaŭ vi partnero estas tutkore bonvena! Bonvolu anonci vian partoprenon plej laste vendredon la 10-an de decembro. Antaŭpago estas dezirata antaŭ tiu dato al la bankkonto de LEA n-ro 735-0190144-12.

**"Van den Vos Reynaerde"**

Tiu ĉi fama flandra bestepopeo, verkita de nekonata poeto ĉirkaŭ 1250, ankaŭ en nia tempo estas konsiderata kiel la plej grava kontribuo de la nederlanda lingvo al la monda literaturo. Jam en la mezepoko la poemo estis tradukita en plurajn lingvojn.

Nun fine ĝi estis tradukita en la lingvon internacian Esperanto, por ke ĉiuj esperantistoj en la mondo povu ĝui la groteskajn aventurojn de la ruza hipokrita vulpo.

La libro en A-5 formato enhavas 164 paĝajn kun ilustraĵoj, enkonduko kaj klarigaj notoj.

Ĝi haveblas en la libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 2015 BJ Roterdamo, Nederlando, pri kiu respondecas Ionel Onet

[ionel@co.uea.org](mailto:ionel@co.uea.org)

aŭ ĉe la tradukinto, Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel.

[pieter.doumen@adsl4you.be](mailto:pieter.doumen@adsl4you.be)

Prezo: € 15.00 + sendokostoj

(por Belgio: € 2,97)

